



# LA VERDA LUPEO
# FENIKSO






N-ro 48 | 1980-1 marto | 11a jaro


## Esperanto Ligo Filatelista = ELF

**amika rondo de Esperantaĵkolektantoj = arek**



Per Esperanto por mondpaco

Leipzig vom 7.–9. März 1980
Internationales
Esperanto-Messetreffen




Organiza Komitato
- IFER -
Kulturbund der DDR
DDR – 7010 Leipzig
Käthe-Kollwitz-Str. 115



## Bonan Tagon, karaj klubaj geamikoj,

jen ĝi estas en niaj manoj, la unua informilo de la jaro 80. La enhavo ĉi-foje vere varia: suplemento por la suplemento, novaj stampoj, novaj glumarkoj, numismatiko, stampdiskuta anguleto.

Granda parto de niaj klubaj geamikoj jam egaligis jarkotizon por tiu ĉi jaro kaj certe la ceteraj tion nun faras al Paulsson. Ankoraŭfoje ni dankas al ĉiuj tiuj geamikoj, kiuj pasintjare kontribuis al la enhavo de nia informilo. Kaj ni pardonpetas denove pro la mankoj de nia informilo, kiuj ĉiam denove nin surprizas.

## Ni bonvenigas la novajn membrojn:

Bedřich Motalek, CS-798 45 Suchdolf na Prostejov

. . . Mi kolektas poŝtmarkojn, bildkartojn k.t.p., sed ankaŭ kuracas diabeton kaj malfacilojn stomakajn, galvezikajn, duodenajn kaj hepatajn per kuraca herbo ĉiulande kreskanta. Mi serĉas esperantistajn filatelistojn kaj aliajn malsanajn homojn en la tuta mondo . . .

Francesco Pignatelli, Via Volotti 5 int. 10, I-351 00 Padova

. . . komencis kunmeti teman kolekton pri Esperanto kaj bezonas ĉiuspecan filatelan materialon. Li rekompencas per pm-serioj de Italio. Vatikano kaj San Marino. Sed volonte li ankaŭ interŝanĝas seriojn kontraŭ serioj el la tuta mondo . . .

Ralph Murphy, 231 Ashmont Street, Dorchester, Ma 02124 USA

. . . Ne venis sciigoj pri liaj kolekto-interesoj al la redaktoro . . .

Feodor Jelenc, 97, rue Aglophile-Fradin, F-861 00 Chatellerault

. . . Ordigis kotizon por 1979 kaj anoncis egaligon por 1980 . . .

Leif Gunnar Karlsson, Matojärvigatan 28, S-981 00 Kiruna

. . . Ne menciis la kolektdezirojn.

Robert Lefebvre, Str. César-Willefert 1, F-621 10 Hénin-Beaumont

. . . Kol: E-pm.

### Novaj erinofilaĵoj (glumarkoj)

65-a UK Stockholm
La Naturamikoj (kofroetikedo)
Oberkirch kun E-strato (kofro-etikedo)
21a IFES en Plan 1980
Esperantujo-2 steloj-Studento Zamenhof
Mondpaca Esperantista Movado (ronda trikolora)
E – Det moderna int. spraket – Upplysningar . . .
E-monumento en Kioto de Oomoto
Semajno de Internacia Amikeco

ESPERANTO
PER ESPERANTO
POR MONDPACO

## BRA 2 – la plej rara?

Nun ankaŭ venis la enketiloj de niaj geamikoj Strönne, Simon, Nietert, Straif, Dalet, Hirsch, Bourry k Burmeister. En la plej kompleta ĝis nun konata kolekto mankas nur BRA 2 kaj JU 8, krome subnumeroj BRA 1-1 kaj BRA 1-3. Cetere la stampo BRA 2 mankas en ĝis nun ĉiuj ricevitaj enketiloj. Mankas tamen ankoraŭ de multaj niaj geamikoj la plenigitaj enketiloj kaj tio bremsas la prilaboron de la enketiloj.

## Niaj novaj stampoj

**HU 71 aperis**

Nia kluba amiko Vilmos Radnai informis pri la plej nova poŝta Esperanto-stampo en Hungario. 18.11.1979 oni en Fot uzis ĝin. En la stampobildo aperas la teksto

ESPERANTO DEKLAMKONKURSO


kaj la enblemo de la Internacia Jaro de la infano.

**Hungara VEF 79 sen nova stampo**

La sama amiko sendis poŝtan stampon el tiu jam tradicia 9a VEF, sed ni konstatis, ke ĉi-foje la organizintoj ne ŝanĝis la stampilon, ĉar en la teksto aperas ankoraŭ "8a VEF", krome, almenaŭ en la ricevita ekzemplero la jarcifero en la dato nur mane estas notita. Temas do ne pri "HU 72", sed pri reuzo de HU 65.

**Afrankstampo en Danlando**

Doktoro Werner Bormann informis pri nova afrankstampo uzata en Aarhus de la Esperanto-Centro. La ruĝa stampo tekstas: "Esperanto – det andet sprog for alle", pozas en ĝi ankaŭ tiu "e"-vireto kun ĉapelo k valizo. La valorstampo havas numeron TN 471 kaj indikon DANMARK KGL POST.




**Germana Esperanto Asocio uzas afrankstampon**

Nia kluba amiko Richard Hirsch sendis al ni la novan afrankstampon de GEA. La germanlingva teksto diras: "Esperanto – Sprache für Europa – und die ganze Welt". Plaĉa kaj okulfrapa, tiu nova afrankstampo.

**Stampo pri Zamenhofa naskiĝtago**

15.12.1979 la poŝtoficejo Czestochowa 17 en Pollando uzis memorigan portretan poŝtan stampon honore al la 120a naskiĝtago de dr Zamenhof. La teksto en la pola diras: 120 ROCZNICA URODZIN DR ZAMENHOFA kaj tre bela portreto pri Zamenhof pozas en la centro de la stampo. La stampon supozeble iniciatis nia klubmemro Biesiada. Ekzistas suvenira koverto pri la jubileulo.

**Nova stampo ankaŭ en Brazilo**

Aranĝite de kaj en "Escola Progresso de Bauru" sub la aŭspicio de "Bauru Esperanto-Societo" kaj patronite de "Bauru Filatela Poŝta Oficejo" okazis plensukcese la "Dua Esperanta Filatela Montro" de la 15a ĝis la 21a de Decembro 1979.

La sespersona organiza komisiono petis kaj ricevis specialan oficialan memorigan poŝtan stampon "ce Empresa Brasileira de Correios e Telegrafos" E.C.T., tio estas "Brazila Telegrafa Poŝta Entrepreno" omaĝe al L.L. Zamenhof, la aŭtoro de Esperanto, okaze de lia 120a naskiĝjara datreveno, kaj al la 30a fonda datreveno de "Escola Progresso" kaj al "Bauru Esperanto-Societo".

La stampo havas la tekston: II MOSTRA FILATELICA ESPERANTISTA – BAURU – ESCOLA PROGRESSO – 15 a. 21.12.79.

En la stampomezo pozas literoj ECT (vidu supre!), mapo de Brazilo, kvinpinta stelo kaj signo EP en cirkleto. Diametro: 31.

## GDR kun jubilea stampo

"Esperanto-Jubileo" – sub tiu titolo la tutlanda GDR-gazeto DER MORGEN, kiu ĉiudimanĉe enhavas paĝon de filatelio, anoncis aperon de memoriga Esperanto-stampo en Finsterwalde/GDR.

Tiu stampo antentigas pri la dekkvin-jara jubileo de la E-movado en la Kulturligo de GDR. En la jaro 1965 la Esperanto-Asocio de GDR konstituiĝis kiel "Centra Laborrondo Esperanto" (CLE) en tiu Kulturligo, al kiu apartenas multaj aliaj hobio-asocioj. Ekzemple la filatelistoj, foto-amatoroj, mineralistoj, numismatikistoj, natur-protektantoj, kakteo- kaj orkideokulturistoj ktp ktp.

Hodiaŭ la ĉirkaŭ dumil Esperantistoj en GDR havas bonan reputacion kaj estas reprezentataj en ĉiuj kampo de tiu Kulturligo. Krome, multaj Esperantistoj, proponitaj de lokaj Esperanto-kluboj kaj elektitaj en ĝeneralaj tutlandaj balotoj, honorofice funkcias kiel popolaj deputitoj.

En la stampobildo pozas portreto de Cartesius (Rene Descartes – 1596/1650), kiu revis pri universala lingvo. Tiel li ekz. skribis en sia "Harmonie universelle" ke "arta lingvo estas ebla, kaj oni povas trovi sciencon, formulantan ties principojn".

Agrable impresas, ke Medicina Fakrondo en CLE surpresigis ordinarajn poŝtkartojn kun nominaloj de 10 fenigoj (poŝta tarifo por enlando kaj al socialisma landaro) kaj 25 fenigoj (poŝta tarifo por la kapitalisma landaro kaj landoj, kiuj ne aliĝis al la OSS-kontrakto), kun la esperantigita eldiro de Cartesius.

La Cartesius-stampoj estas haveblaj pere de Dr. Giso Brosche, DDR 7981 Rückersdorf kontraŭ 3 IRK aŭ post interkonsento kontraŭ primedicinaj filatelaĵoj.

## Suplemento por la suplemento

*Novaj stampoj:*

| | | | | |
|---|---|---|---|---|
| HU | 71 | Fot | 1979 18.11 | E-Deklamkonkurso |
| BRA | 30 | Bauru (SP) | 1979 15.12 | 2-a Filatela E-Ekspozicio |
| PO | 119 | Czestochowa 17 | 1979 15.12 | 120a naskiĝtago de Zamenhof |
| GDR | 5 | Finsterwalde 1 | 1980 5.1. | 15 jaroj E en GDR-Kulturligo |

*Novaj afrankstampoj:*

| | | | | | |
|---|---|---|---|---|---|
| AS | 15 | Utrecht | 1970 | Zamenhofdreef | (nro 13061) |
| AS | 16 | Utrecht | 1974 | Zamenhofdreef | (nro 17731) |
| AS | 17 | Aarhus | 1979 | Esperanto . . . | (nr TN 471) |
| AS | 18 | Bad Hersfeld 1 | 1980 | Esperanto . . . | (sen nro) |

*Novaj malnovaj reko-markoj!!*

| | | |
|---|---|---|
| Hago | 1937 | (IKUE-kgr). |
| Amsterdam | 1940 | (FLE-kgr). |
| Heerlen | 1947 | (28a FLE-kgr). |

*Kompletigoj:*

| | | | | |
|---|---|---|---|---|
| FRA | 43 | ankaŭ kapopieda | | |
| HU | 65 | | 1978 28.12.–2.1.79 | |
| | | | 1979 28.12. | (reuzo por la 9a VEF) |
| LUK | 1 | | 1978 1–9.9 | |
| | | | 1979 7–14.8 | |

★

## Stampdiskuta angulo

**SVI 9 ankaŭ aŭguste!**

Nia klubano Debertonne sendis fotokopion de tiu ms kun la dato de 3.8.79–16. Li ĵetis pk al sia propra adreso en surstratan kongresej-proksiman poŝtokeston. Kiu posedas aliajn aŭgustajn datojn? Certe nur malmultaj, ĉar kiu ekspedas poŝtajon de surstrata kesto, se en kongresejo uzatas speciala E-stampo . . .

**Klarigoj pri la ciferoj en SVI 9**
Plej ofte troveblas en la nuliga stampo de la maŝinstampo la dato 21.2.79–9. Estas klare, ke tio signifas 21a de februaro 1979. Sed pri lasta cifero nur malmultaj scias, ke temas pri la horo (do la naŭa horo) de la koncerna tago. Ne pri la numero de iu poŝtkesto au simila. Sekve, se aperas kiel lastaj ciferoj ekz. 16, tiam la stampilo estis uzata en la 16a horo.

**Kaj aliaj ciferoj en CS 1**
Nia amiko Simon skribis, ke "... en kelkaj landoj oni uzis ambaŭ roman- kaj arabciferajn horindikojn en la sama stampilo por diferencigi inter matenaj kaj posttagmezaj horoj. Tio okazis en la svisa stampo 1 de Bern (!!) kaj verŝajne ankaŭ kaŭzis la variaĵojn en la CS 1 stampoj.

**Finsterwalde vere kun tri koloroj!**
Nia amiko Simon demandas, "ĉu la Finsterwalde-stampo vere ekzistas en tri koloroj pro uzo de diversaj inkoj" kaj daŭrigas "ŝajnas al mi, ke tiuj kolorvariaĵoj okazis, kiam la stampilo ne estis sufiĉe inkita. Tio okazis ankaŭ dum la uzo de aŭstraj stampoj." Do, mi, la redaktoro, havis la bonŝancon esplori surloke la tutan stokon k invervjui d-ron Brosche. La viola devenas el erara, ne korekta inko. Verŝajne nur la unuan tagon oni ĝin uzis kaj poste retiris. (4.7.79–10). La sekvan tagon jam ni trovas du div. kolorojn: la matena stampo kun la 10a horo montras ankoraŭ ian nigre-violan mikskoloron. (Verŝajne oni verŝis nigran inkon sur la violinkan kusenon) Sed tiun mikskoloron ni povas kalkuli inter "viola". La posttagmeza stampo kun la hor-indiko 14a montras jam pure brune-nigran inkon. (Ekzistas multaj en tiu koloro) Pure blue-nigran farbon ricevis la kvanto, stampita 10.7.79–10. Okulfrapaj estas la kolordiferencoj sub neona lumo. Mi intencas noti en katalogo nur "nigra k viola", sed specialistoj sciu, ke estas tri koloroj.
Al niaj "normalaj" kolektantoj ni devas diri, ke sufiĉas, se ili posedas iu ajn el la tri koloroj. (Tio validas ankaŭ por la multaj aliaj stampoj, kiuj havas diversajn kolorojn). Eĉ averti ni devas: neniam montru en filatela konkura ekspozicio plurajn kolorojn. La ĵurioj tion ne ŝatas kaj rekompencus per minus-poentoj!

## 2 diversaj ZAMENHOFDREEF!

Kion ni "timis", tio okazis. Ekzistas dua alia Zamenhofdreef-afrankstampo. Werner Simon skribis:
"Kiel vi scias, mi kolektas afrankstampojn de la tuta mondo kaj konas multajn kolektantojn en diversaj landoj. Do, mi demandis holandan kolektanton pri la Zamenhofdreef-stampo kaj li raportis, ke li posedas la afrankstampon 13061 (vidu en nia informilo n-ro 44/79) jam kun la dato de 03 05 70! Sed ... la surprizo estas, ke li ankaŭ havas afrankstampon n-ro 17731 de alia firmao kun Zamenhofdreef-adreso en la stampo, kiu estis uzata en 1973, sed la firmao ne plu estas en la Zamenhofdreef kaj la afrankstampo ne plus estas havebla ..."

**Stampo "bruselo-nordkapo"**
Venis letero kun enhavo: "mi skribis al tiu firmao por mendi tiun stampon, sed kvankam mi aldonis monon, neniam ricevis respondon ... mi tre dubas, ĉu mi konsideru tiun stampon por mia kolekto, kvankam la nomo estas en Esperanto, ĝi estas stampo sen klara rilato al nia temo".
Eble estas aliaj, kiuj sendis monon aŭ alian kaj ricevis nenion? Skribu pri tio al la redaktoro.

**AU 4 viola kun dato 19.10.1947**
"Mi nun ricevis de aŭstra komercisto supre nomitan stampon en viola-ne katalogita" – Werner Heimlich. Eble aliaj niaj kolektantoj ĝin ankaŭ posedas en viola? Rigardu kaj informu!

## Pri BU 1

Odon Horak el Brno skribis:

"Mi posedas de tiu 30a bulgara E-kongreso 2 diversajn stampojn, ambaŭ sur la memoriga E-pm, kaj sur la suveniraj kartoj.

Tiu karto, kiu havas la konatan stampon de 16.VI.47, kun la loko-indiko REPUBLIKA BULGARIA, tekstas en la malsupra linio: 30-a JUBILEA KONGRESO DE LA BULG ESPER-RO. Sur la dua preskaŭ samaspekta suvenira karto aperas alia, ne listigita (katalogita) stampo.

Temas pri ducirkla, stampo kun trabeto en mezo. La dato en la trabo: 6–7.IX.1947. Sub trabo en la segmento estas kvinpinta stelo. PLOVDIV estas en suba parto de la du cirklo dum en cetera loko estas la teksto: 30-a JUBILEA BULGARA ESPERANTO KONGRESO. Koloro: helnigra.

La uzita suvenira karto diferencas de la pli frue uzita ĝenerale en la mezuro, sed speciale pere de la suba teksta linio: "30-a jubilea kongreso de la bulgara esperantistaro en Plovdiv."

Eble tiu lasta stampo estas privata, nepoŝta stampo? Kiu scias pli pri ĝi?"

Interesa problemo, kiun prezentas Horak al ni, kiu sukcesis iomete heligi la aferon ĉirkaŭ tiu stampo. En niaj pli fruaj stampokatalogoj ĉiam ni notis post BU 1: helnigra uzita en Plovdiv, sed neniam iu vidis tiun "helnigran", kaj tiun noton ni transprenis el iam aperinta EKIK-katalogo. La bulgaroj mem neniam povis klarigi la aferon ĉirkaŭ BU 1. Tial ni nun pro niaj longjaraj spertoj povas nur supozi, ke la stampo "REPUBLIKA BULGARIA" estas speco de unuataga stampo, oni devus konsulti Bulgario-specialistojn, kiuj povus kompari tiun pecon kun aliaj samjare aperintaj poŝtmarkoj.

Preskaŭ tute certaj ni estas, ke la priskribita ducirkla stampo de Plovdiv estas privata nepoŝta, uzita aŭ farita de LKK. Tamen ni ne estas plene certaj. Rekomendi ni povas, nepre konservi tiun pecon, sed ankaŭ la alian. Cetere nek unu, nek aliaj karto portas iun adreson.

Eble niaj membroj Simon, Amouroux, Biesiada, Dalet kaj Berkhout kaj aliaj skribas mallonge pri siaj BU 1 al la redaktoro, kiu klopodos solvi la problemon ĉi-jare dum 40a bulgara E-kgr en Plovdiv.

## Ĝis nun nekonata E-filatela objekto:

"Standardaj poŝtkartoj de USSR 1923–1931" estas la titolo de por ni E-filatelistoj ege interesa ekspozicia objekto de la filatelisto Muŝenko en Sovetunio. Ja multaj el niaj klubaj geamikoj posedas kelkajn tiajn sovetuniajn tutaĵojn, kiuj surhavas oficialajn esperantlingvajn tekstojn, kiel ekz. "Poŝta Karto kun afrankita Respondo" aŭ: "Poŝta Karto por Respondo".

En tiu objekto mi trovis 93 diversajn tiajn poŝtkartojn, inter ili 50 diversajn t.n. "duoblo-poŝtkartojn". La imponiga objekto, kies klariga teksto estis en la rusa, kaj kiu konsistis preskaŭ tute el la E-poŝtkartoj, faras puran kaj bone prilaboritan impreson.

Tiun ekspozaĵon mi renkontis en "Amikeca ekspozicio GDR-USSR", okazinta dum oktobro 1979 en Karl-Marx-Stadt inter 45 aliaj filatelaj objektoj (ne-esperantaj). La ĵurio donis al ĝi la arĝentan medalon.

★

## La pola Zamenhof-monero

Ekde 1972 la Pola ŝtata Monfarejo emisias ĉiujare unu au du monerojn en serio nomata "Grandaj Poloj". Post F. Chopin kiu inaŭguris tiun serion estis honoritaj M. Kopernik, M. Curie – Sklodowska, I. Paderewski, B. Sienkiewicz kaj aliaj. Dektria en la serio viciĝis lastan jaron D-ro Zamenhof.

Krom la unua monero pri Chopin kiu havis nominalon de 50 zlotoj, ĉiuj postaj estis 100 zlotaj kun samaj karakterizaĵoj, metalo: arĝento je titro 625/1000, diametro: 32 mm kaj pezo 16,5 gr. eldonkvanto: 30 000 kaj tia estis ankaŭ la Zamenhofa.

La averso prezentas la blazonon de Pollando inter la dato 19 - 79. Cirkla teksto: POLSKA RZECZPOSPOLITA LUDOWA kaj sube nombro 100 inter ZL - ZL. La reverso montras la profilan portreton de Zamenhof rigardanta maldekstren kaj cirkla teksto: LUDWIK · ZAMENHOF · 1859–1917. La artisto Stanislawa Watrobska ne subskribis sian verkon.

La ŝtata monfarejo en Varsovio havas kutimon eldoni, je nur malmultaj ekzempleroj, kaj nur por kolektantoj, aliajn projektojn konkurintajn. Tial, alia monero estis stampita kun gravurita mencio "proba" t.e. "provo". Tiu versio, (probable eldonita nur je 3 000 ekzempleroj) prezentas ĉiajn karakterizaĵojn de la oficiala monero, samaj estas titro, dimensio, pezo. La averso ankaŭ estas tute identa kaj indikas la nominalon de 100 zlotoj kvankam teorie la provo ne havas cirkulan valoron. Tamen ĝi estas vendata multe pli multekosta ol la ordinaraj.

La provo-eldono de la monero pri Zamenhof prezentas reprodukton laŭ la foto kiun faris Caudevelle en 1905 en Bulonjo-ĉe-maro, t.e. fronta vizaĝo. Koncerne la portreton de la oficiala monero, ĝi estas reprodukto de la profilo de la iama spesmilo kaj ankaŭ de la 10 kaj 25 steloj emisiitaj far la Universala Ligo. Plej klara diferenco situas en la kravato de Zamenhof kiu estas fiksita per bantoj sur la spesmilo kaj sur la stelo-moneroj dum la pola monero prezentas node aranĝitan kravaton, tian kia montras la skulptaĵo modlita de Fr. Brodauf en 1909 kiu verŝajne inspiris la aŭtoron de la spesmila portreto. Tiu ĉi estis mem inspirita de foto de Zamenhof, dekstren turnita, farita en 1907, aŭ eble iom pli frue.

*Marcel Delcourt*
*U.E.A.-delgito pri numismatiko*

## Esperanto-Insignoj de Italio

**• Naciaj Italaj Kongresoj**

| | | | |
|---|---|---|---|
| 1952 | – | Bologna | 24a – kartona |
| 1953 | – | Como | 25a – kartona |
| 1954 | – | Sassari | 26a – kartona |
| 1956 | – | Massa | 27a – kartona |
| 1957 | – | Varese | 28a – leda |
| 1958 | – | Palermo | 29a – kartona |
| 1959 | – | Firenze | 30a – leda |
| 1960 | – | Cortina d'Ampezzo | 31a – leda |
| 1961 | – | Sanremo | 32a – ŝtofa |
| 1962 | – | San Benedetto d. T | 33a – kartona |
| 1963 | – | Saint Vincent | 34a – kartona |
| 1964 | – | Sorrento | 35a – kartona |
| 1965 | – | Rimini | 36a – kartona |
| 1966 | – | Carrara | 37a – marmora |
| 1967 | – | Catania | 38a – kartona |
| 1968 | – | Montecatini | 39a – plastika |
| 1969 | – | Como | 40a – plastika |
| 1970 | – | Krozado sur ŝipo | 41a – metala |
| 1971 | – | Grosseto | 42a – metala |
| 1972 | – | Pisa | 43a – kartona |
| 1973 | – | Trento | 44a – plastika |
| 1974 | – | Verona | 45a – plastika |
| 1975 | – | Trieste | 46a – plastika |
| 1976 | – | Massa | 47a – plastika |
| 1977 | – | Campobasso | 48a – plastika |
| 1978 | – | Cesena | 49a – plastika |
| 1979 | – | Lido Jesolo | 50a – plastika |

**• UK**

| | | | |
|---|---|---|---|
| 1955 | – | Bologna | 40a – plastika |

**• IFEF-kgr**

| | | | |
|---|---|---|---|
| 1956 | – | Verona | 6a – metala |
| 1970 | – | Rimini | 22a – metala |
| 1978 | – | Roma | 30a – plastika |

**• IFES**

| | | | |
|---|---|---|---|
| 1975 | – | Plan Val Gardena | 16a – metala |

**• IKUE-kgr**

| | | | |
|---|---|---|---|
| 1962 | – | Roma | 29a – metala |
| 1975 | – | Roma | 36a – plastika |

**• SAT-kgr**

| | | | |
|---|---|---|---|
| 1974 | – | Bergamo | 47a – metala |

**• ILEI-konferenco**

| | | | |
|---|---|---|---|
| 1976 | – | Sanmarino | 10a – plastika |

**ELF–AREK–KLUBO**

**Prezidanto:**
Ivar Paulsson, S-171 33 Solna, Algatan 3

**Kasisto:**
Same. Sendu jarkotizon de 15 IRK aŭ 25 sved. kronoj.
Poŝtkonto 51 57 85-4, I. Paulsson, Solna

**Stampobanko:**
Werner Heimlich, D-304 Soltau, Fröbelstr. 4 (vicprezidanto)

**Redaktoro:**
Rudolf Burmeister, DDR 9047, Karl-Marx-Stadt, W.-Firl-Str. 30

---




---

## Anoncoj:

Jean Amouroux, 1 rue de Sorede, F-66000 Perpignan deziras interŝanĝi ĉiuepokajn poŝtkartojn en aŭ pri Esperanto pri propagando, kongresoj, eventoj, karikaturoj ktp. prefere vojaĝintaj tra la poŝto de sendinto al adresito. Repagas laŭdezire per samtipaj E-kartoj aŭ esperantaĵoj.

Ole Börresen en Norvegio kolektas nur E-poŝtmarkojn!

La Redaktoro serĉas unuopajn ekzemplerojn de laboristaj e-gazetoj de antaŭ 1936 (ekz. Popola Fronto, Internacia Socia Revuo, Sennacieca Revuo k.a.) Rekompencas per unuopaj e-gazetoj germanaj de antaŭ 1936.

Plie li serĉas kongresajn legitimilojn kaj kongresajn insignojn de laboristaj e-kongresoj sed ankaŭ de aliaj.

## Esperanto-kalendaretoj

Ankaŭ ili apartenas jam al la "Esperantaĵoj" kaj kelkaj inter ni ilin ŝatas kolekti, aliaj tutsimple ilin utiligi por la ĉiutaga vivo. En GDR denove aperis la jam konata (Ziesing)-kalendareto por 1980. Sed unuafoje ankaŭ la E-klubo en Leipzig presigis IFER-kalendareton. Ambaŭ aperis en po dumil ekzempleroj. La redaktoro disponas pri stoko de ambaŭ por sendi al interesuloj.